Nia vivo

‘LEGENDA’ IEK EN PAZARĜIK

IEK, 14a - 23a de julio 2007, pri “Mitoj kaj legendoj”, en Pazarĝik, Bulgario.

Sennuba intense blua ĉielo, granda varmeco kaj afable ridetanta organizanto Georgi MIHALKOV atendis nin, la aviadile alvenintajn partoprenontojn de la ĉi-jara IEK, en la nova flughaveno de Sofio. Georgi, de esperantistoj pli bone konata sub lia plumnomo Julian MODEST, afablis ankoraŭ tiam, kiam vespere la lastaj tri pasaĝeroj kun pli ol unuhora malfruo paŝis en la atendohalon. Ankaŭ la pli frue alvenintaj IEK-anoj estis konservintaj sian bonhumoron: ili utiligis la flughavenan atendadon por provizore anticipi la interkonan vesperon.

Post unuhora busveturado ni atingis nian kongresurbon Pazarĝik, tute ĝustatempe por povi daŭrigi per interkona vespermanĝo kun la jam aliaj alvenintaj geamikaj OSIEK-anoj. Poste en bela enkorta restoracio sub la arboj jam babile audiĝis unuaj “mitoj kaj legendoj” el nia verda mondeto.

La venontan matenon okazis la inaŭguro de la Internacia Esperanto-Konferenco '2007 en la Armea Kulturdomo de Pazarĝik. La prezidanto de OSIEK, Ed BORSBOOM, kore bonvenigis la konferencanojn kaj precipe la gastojn, nome Dimitar VECOV-on, la estron de la kultura fako de la urbo, kaj Petar TODOROV-on, la prezidanton de la ĵus 100-jariĝinta Bulgara Esperanto-Asocio kaj kelkajn ĉeestantajn lokajn Esperantistojn.

La parolon de Todorov pri la 100-jara movado en Bulgario solene ornamis la kantoj de la Virina Esperanto-Koruso el Pazarĝik sub la gvido de Angel CENOV, kiuj ricevis grandan aplaŭdon por ilia prezentado.

Okaze de la 100-jara jubileo Dimitar Vecov kiel anstataŭanto de la urbestro transdonis al BEA valoran albumon pri la eventoj dum la t. n. “Aprila Ribelo de 1876” kontraŭ la turkoj. Ivan Estadiev, la urbestro, malebligita ĉeesti ĉi-tage, cetere profitis la okazon renkonti kaj saluti la eksterlandajn konferencanojn du tagojn poste en la konferenca hotelo.

La postaj tagoj alportis riĉan kaj multfacetan programon; matene ni kunvenis en la hotela konferencejo – feliĉe taŭge klimatizita – por

La virina Esperanto-koruso de Pazarĝik dum la inaŭguro de la konferenco.


Aleksandar Arnaudov

Petar Todorov

Eva Bojaĝieva

David Kelso

Mantha Christou

Nedelin Bojaĝiev

Maria Butan


Georgi Mihalkov (Julian Modest)


Abel Montagut

Radka Stojanova

Ljubomir Trifonĉovski

Organizis

Éric Laubacher: kasisto.

Grozdenka Filipova: “dekstra mano”.

Françoise Laubacher: asistanto.



Rémy Bouchet: fotisto.

Pál Kozsuch: libroservo.



Georgi Mihalkov/Julian Modest: loka ĉefo.

Maldekstre: Ed Borsboom, prezidanto.

Dekstre: Anne Jausions, vic-prezidanto.

ndlr: la fotojn pri IEK en Pazarĝik ni elektis el pli ol 1000 fotoj ricevitaj de Rémy BOUCHET, Frederika kaj Hartmut FILLMANN, Éric kaj Françoise LAUBACHER.

sekvi la prelegojn. Posttagmeze Georgi/Julian kaj lia "dekstra mano", Grozdenka FILIPOVA, gvidis nin al vizitindaj lokoj en Pazarĝik, "la malgranda bazaro":

La ĉi-jara temo komence igis nin rekapitulacii la esencon de "mitoj" kaj "legendoj".

Dum mito estas rakonto pri iu de homo ne racie kaptebla fenomeno, ekzemple la komenco de la universo aŭ la estiĝo de la vivo sur la tero, legendoj fantazie ornamas kaj glorigas iun historian okazintaĵon aŭ la vivon de fama, eksterordinara homo, ekzemple de heroo aŭ de sanktulo. Legendoj, kvankam ili ne objektive priskribas historiajn eventojn, estas fekunda grundo por la etnografia scienco: ili ekzemple mencias la malnovajn nomojn de loĝlokoj, pejzaĝoj, riveroj. Ili rakontas pri la antaŭaj tradicioj, la laboro, la ilaro, same pri kutimoj kaj moroj, normoj kaj valoroj.

Legendojn el la Sofia, la Rasgrada, la Vraca kaj el la Pazarĝika regionoj klarigis al ni la devenon de lokaj nomoj, la estigon de la preĝejo "Sankta Dipatrino" kaj pri certa kalifo kruela, kiun venkis la amikeco de fidelaj amikoj (Mihalkov, Arnaudov, Todorov, . Stojanova).

Mantha CHRISTOU surbaze de la grekaj mitoj kaj legendoj montris, ke tiaj rakontoj estas mondvasta fenomeno de la homa fantazio kaj kulturo. La greka mitaro, kiu famiĝis per la transdono de la Romianoj, naskiĝis ĉirkaŭ la jaro 900 a.K. Ili respegulis "la vivon", nome la dezirojn, pensojn, virtojn kaj suferojn de la helenaj dioj kaj herooj.

David KELSO ekzamenis la mitojn kaj legendojn, kiuj celas krei la nacian identecon. Ili intencas glorigi la "nacion", nocio, kiu naskis nur fine de la 18a jarcento kiel "invento" de la fortikiĝanta burĝaro kiel tuto el gento, lando kaj ŝtato. La mitoj kaj legendoj pentras la koncernan nacion kiel elstaran, unikan, elektitan ktp. Kelso senmaskigis tiujn glorigojn vanajn memtrompojn referante pri la rezultoj de DNA-ekzamenoj. Ili demonstras, ke la genetika kodo de ekzemple la Eŭropanoj estas tiom simila kaj la diferencoj tiom malmultaj, ke diferencigi inter pluraj eŭropaj gentoj estas science ne plu serioza

La dignecon en rumanaj legendoj reliefigis Maria BUTAN surbaze de du legendoj. Digno ampleksas seriozecon, honestecon, gravecon kaj memestimon. En *La ŝafideto*, cetere i.a. tradukita de Kálmán KALOCSAY, kaj la legendo de "Majstro Manolo" la agantoj digne akceptas la propran morton aŭ tiun de proksima parenco kiel sorton, kiu rezultas el la fidela plenumo de la unufoje por ĉiam akceptita tasko. Ambaŭ legendoj apartenas al la nacia poezia trezoro kaj estas prezentataj al la junularo kiel sekvindaj ekzemploj de honesta konduto.

Tute alian aliron al la temo trovis Abel MONTAGUT. La aŭtoro de *Poemo de Utnoa*, patro de adoleskanta filo, montriĝis profunda konanto de junulaj ludoj, kiuj baziĝas sur klasikaj aŭ nove inventitaj mitoj kaj legendoj. Tiuj rol-, kart-, libro-, komputilaj kaj interretaj ludoj forportas la plej ofte knabajn ludantojn en fikcian mondon, kie ili, sekvante komplikajn

Amuziĝis

"… io malfruas!"

David Kelso



Horst Vogt

Theodora Butan, Nedelin Bojaĝiev

Frederika kaj Hartmut Fillmann

Renkontiĝo kun Zamenhof

Ed Borsboom

regulojn, batalas kontraŭ monstroj aŭ danĝeraj sinistruloj. Tiu speco de ludoj surscenigis, post kiam *La mastro de l'ringoj* de TOLKIEN estis kaŭzinta revivigon de mitoj penetrantaj la tutan socion.

Ljubomir TRIFONĈOVSKI skizis Esperanton *inter mitoj, legendoj kaj realo*, interalie pentrante la personecon de la 'mitomaniulo' kaj falsa markizo Louis DE BEAUFRONT.

Pri *Orfeo kaj orfeismo* prelegis Nedelin BOJAĜIEV. La trakoj, antikva popolo priskribita i.a. de Homero, setlis en la tuta balkano. Filo de traka reĝo, Orfeo estis benita kantisto, kiu kiel konate pro sia eksterordinara kantarto igis la diojn cedi al lia peto, regvidi lian edzinon Eŭridico el la Hadeso. Baziĝante sur la instruoj de la mistika Orfeo estiĝis religia kulto, nomita orfeismo. La anoj de tiu instruo kredis al la migrado de la animoj kaj al vivo en la postmorta mondo.

Pri la variaj roloj, kiujn amo ludas en mitoj kaj legendoj, ekzemple la amo al la patrujo, al la gepatroj, al la infanoj, al Dio aŭ al la amat(in)o, atentigis nin Eva BOJAĜIEVA. Ŝi per propraj poemo kaj kanto finis la prelegserion de nia Pazarĝika semajno.

Pro la varmeco la posttagmezaj ekskursoj komencis nur je la kvara (post dormema ripozo siesta). Kaj eĉ tiam ni piediris al nia celo singarde evitante la plenan sunon kaj ĉiam serĉante la protekton de ombraj domoj kaj arboj.

Jam dimanĉe ni gastis ĉe la inaŭguro de tre interesa grafika ekspozicio. Nikola MITOV-KUMARICATA, elstara bulgara artisto kaj amiko de Esperanto, ekspoziciis portretojn de famaj bulgaraj personoj kaj montris vidaĵojn de Sofio kaj el la kamparoj.

En la sekvaj posttagmezoj Georgi kaj Grozdenka gvidis nin al vizitindaj lokoj de la urbo: al la etnografia muzeo situanta en la domo de la fama poeto Konstantin VELIĈKOV, en la urban artgalerion kaj la historian muzeon, en turkan moskeon, la ortodoksajn preĝejojn Sankta Dipatrino, Sanktaj Konstantin kaj Elena kaj de Sankta Georgo. La ekskursoj ĉiam finiĝis en iu ombra restoracio, kie ni ĉe freŝaj trinkaĵoj atendis la horon de la vespermanĝo.



OSIEK-premiitoj '2007: Ĵak Le Puil kaj Armela LeQuint.

La ĝenerala asembleo, lasta programero en la oficiala programo de la semajno, voĉdonis por OSIEK-premio '2007: Armela LEQUINT kaj Ĵak LE PUIL ricevis ĝin por sia traduko de *Vojaĝo ĝis noktofino*, romano de L.-F. CÉLINE. IEK '2008 okazos en Nova Gorica, Slovenio, pri la temo *Fernando de Diego*. La estraro plie anoncis, ke estas pripensoj okazigi en 2009 IEK en Herzberg apud Harc-montaro en Germanio. La financoj de OSIEK estas sanaj kaj la librotenado fare de Eric LAUBACHER, laŭ la atesto de la du kaskontrolistoj, senriproĉa.

Kiu, el la konferencanaro, havis la eblecon, partopreni en la ekskursoj, travivis tri tagojn streĉajn pro la varmego, sed entute neforgeseblajn. La unuan tagon en la malnova urboparto de Plovdiv kaj ĉe la nur antaŭ nelonge elfosita traka templo de Starosel. La duan tagon ni kune busetis al la monaĥejo de Baĉkovo kaj al la fortikaĵo de la reĝo Asen. La fina ekskurso kondukis la vojaĝemulojn en la faman Rozan Valon.

Georgi Mihalkov jam post la fino de la oficiala parto ricevis unuaniman laŭdan aplaŭdon pro sia perfekta organizado de la tuta aranĝo. Li kaj Grozdenka Filipova estis ĉiam alparoleblaj kaj afable helpemaj por solvi problemojn kaj problemetojn, ĉu nealveninta valizo, ĉu pepanta enĉambra aparato, ĉu aĉeto de trajnbileto. Denove koran dankon por ilia sindona laboro.

Horst Vogt